Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Novembro 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 11 (1181)

ISSN 1163.0442 *Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem* 5 €

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

EŬROPA SOCIA FORUMO
SAT partoprenos



Dum sia kunveno en la urbo Kaga (Isikawa) - de la 24-26.10.2003, japanaj SAT-anoj sendis mesaĝon al la Eŭropa Socia Forumo. Sur la foto estas:
Dua vico de maldekstre: OIKAWA Yukiko, TAHIRA Masako, KAWANISI Teturô, LAUFFENBURGER Alain, TANI Hiroyuki. Unua vico de maldekstre: Viola, MAKINO Tetu, BARKOVIĈ Kreŝimir, NISIKAWA Satoru, IE Harumi. Mankis k-do YAMASAKI Seikô pro malsano. Fotis k-do NONOMURA Yô.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...




Karaj,
kiel vi povas konstati, tiun ĉi numeron de Sennaciulo vi ricevas kun granda prokrasto. Ja, mi pasigis iom pli ol tri semajnojn kun niaj japanaj gekamaradoj danke al ilia invito. Mi uzas la okazon por danki publike al ĉiuj kiuj tiel bonkore kaj afable okupiĝis pri mi dum mia restado en Japanio.
De la 24-a ĝis la 26-a de oktobro okazis en la urbo Kaga (Isikawa) kunveno de japanaj SAT-anoj al kiu mi partoprenis (vidu foton frontpaĝe). Dum tiu tre agrabla renkontiĝo en kamaradeca SAT-eca etoso, ni traktis diversajn temojn inter kiuj la kreon de la Japana LEA kaj eventualan kongreson de SAT en Japanio. Detala raporto pri tiu kunveno aperos en la decembra aŭ januara numeroj. Dum la kunveno ni sendis mesaĝon al la Eŭropa Socia Forumo, al la baldaŭa Monda Socia Forumo en Hindio kaj al la preparata Japana Socia Forumo.
*Sed ni revenu al tiu ĉi numero de Sennaciulo. En ĝi aperas nova rubriko pri kiu respondecas nia kamarado Cezar. Temas pri SAT-kulturo. Ni invitas vin ĉiujn kunlabori kaj kontribui al tiu ĉi rubriko. Ankaŭ ni kreis apartajn TTT-paĝojn de SAT pri la SAT-kulturo (vidu: **http://www.marktplatz-deutschland.de/rsabg/pic2/sat-kulturo/**). Krome vi trovos kelkajn aliajn temojn kiuj certe interesos vin. Mi deziras danki al nia k-do Jakvo Schram kiu dum mia foresto kolektis kelkajn kontribuaĵojn kaj preparis ilin por helpi al mi post mia reveno. Ja, tiu helpo estis tre utila, ĉar en la oficejo atendis min amaso da poŝtaĵoj, 1920 retmesaĝoj, mendoj ktp. Evidente, iom post iom mi sukcesos ĉion fari, sed mi petas paciencon de ĉiuj el vi kiuj eventuale atendas mian respondon, aŭ iun alian agon. Dankon. Nun mi preparas min por la ESF kiu komenciĝos post kelkaj tagoj, esperante ke pluraj el vi ankaŭ partoprenos. Kamaradece al ĉiuj,*

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55,
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)

SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !



Nova PIV aperis !
Akiru ĝin ĉe SAT.
Prezo: 70 € + afranko
Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 7,29 €
ekster Eŭropo : 9,49 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ,ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Denove la religio

Marteno Bustin

Tiu-ĉi lando en kiu ni naskiĝis -Hispanio- ĉiam nostalgias pri la pasinteco kaj timas estontecon. Kiel malsekura adoleskanto, Hispanio alkroĉiĝas al la infaneco kaj timas la junecon. Ĝi amas ĉion konatan kaj forpuŝas novaĵojn. Lando kiu dormas ĝoje pensante pri siaj prapatroj kaj enprizonigante ian ajn deziron de libereco. Tiu-ĉi lando havas konstantan generacian konfronton kie la pli aĝaj subpremas, kontrolas kaj trudas siajn valorojn al la junularo kiu volas liberecon, ŝanĝojn kaj progreson.

Hispanio "la katolika", "la spirita rezervujo de Eŭropo", ĉiam alkroĉiĝanta al feroca tradicio, denove aperas kun siaj dramaj dogmoj por bremsi la evoluon de tiu-ĉi lando. Ankoraŭfoje la monarkio kaj la eklezio iras mane en mane kune kun la helpo de la riĉaj "familioj", kiuj neniam rezignis perdi sian povon. Denove tiu-ĉi tandemo vidas kun hororo ke "ilia Hispanio", ilia privata ĉasejo, marŝus tra padoj de libereco.

La hispana dekstro, ĉiam la sama, sentas konstante sian timon pri ĉio kio sonas maldekstre.

Bedaŭrinde la krio "Venas la ruĝuloj !!!", estas hodiaŭ tiel aktuala kiel antaŭ 60 jaroj. La totalisman spiriton oni vidas en ĉiuj politikaj agadoj kiuj baras la intelekton kaj konfuzas la plej multon kun siaj difinoj. Antaŭe ili tute rifuzis la kaŝeman demokratan laikan kaj malfermitan ŝtaton, nuntempe ili ĝin uzas por trudi sian kaŝeman faŝismon.

Progresema kaj demokrata socio havas kiel konstantajn malamikojn, influan ŝtatan eklezion, potencan armeon kaj fortan kapitalismon. Tiu triopo garantias faŝistan ŝtaton, reiron al la pasinteco kaj paralizon de la progreso.

La nuna registaro impregnata de la aŭtoritato kiun al ĝi investas la ne antaŭlonge pasinta historio, iom post iom rehavas la necesajn kolektivojn por trudi kaj daŭrigi totalisman dolĉigitan Ŝtaton



kaj por tio redonas la povon al tiuj kiuj ĝin havis dum tiom da jaroj, kun la escepto de la unuaj demokratiaj jaroj.

La nepoj de la frankistoj rekonkeras sian "heredaĵon" kaj kun pozoj, pli aŭ malpli, de "novaj demokratoj" firmigas siajn leĝodonojn kaj rehavas siajn privilegiojn.

Ni ne forgesos ke la tirana faŝisma frankismo bezonis la katolikan eklezion por ideologii la novajn generaciojn. Dum tiu bedaŭrinda tempo "kuraĝo kaj virto" estis sinonimoj de katolika doktrino. La valoroj de la katolikaj virtoj estis la instrumentoj de la subpremo kaj submeto tra la konscia manipulado de la infanoj kaj junuloj, same kiel la trudado de tenaca patriarka aŭtoritato kaj la timo de la punado kiun suferis en ia ajn malobeo.

La eduka sistemo, en tiu-ĉi lando, antaŭ kaj post la diktaturo, escepte de la Respublika periodo, estis kaj estas en la manoj de la Eklezio helpata kaj subtenata de la ŝtato, senkonsidere ĉu ĝi estas monarkio, faŝismo aŭ demokratio.

Dum la dua Respubliko, la religia temo disdividis la landon en du duonojn, ĉar la kapablo por ĝin modernigi ne ekzistis kaj ne estis eble malpliigi la religian povon kaj influon en ĉiuj sociaj tavoloj, ĉu pro aliancoj ĉu pro submeto.

La diktaturo sukcesis, per la eliminado de ia ajn disidento, malmultigi la antiklerikalan spiriton de tiu epoko, ĉar kun la malapero de la opozicio kaj reedukado de la loĝantaro malmulton povis fari la progreso

por atingi antaŭeniron.
La infanaj mensoj konstruiĝas per la informoj kaj spertoj kiujn alportas la edukado kaj se tiu-ĉi estas precipe katolika, ĝi troviĝas en la antipodoj de la raciismo kaj sciencismo.
Tiu-ĉi lando kredas en "la Sanktan Katolikan Eklezion" kaj ĝiaj preceptoj, dogmoj kaj doktrinoj dum al ĝi mankas racia sento, logiko kaj esploroj.
La unuiĝo de la Eklezio kun la Ŝtato konstruis tiun-ĉi bedaŭrindan realon kiu sin nutras de ideo trudata de la religio sur ĉiuj aliaj: la timo al libereco. Ne senintence dum multaj jaroj oni klarigis pri la malbonoj kiujn kunportas la libereco kaj la neceso ĝin porciumi, kontroli per tiuj kiuj posedas la povon.
La katolika religio, kiel ĉiuj aliaj, starigas feran kaj senmovan hierarkion: Dio, patrio, patro kaj mastro.
La origino de tiu-ĉi aŭtoritato, de ĝia akcepto kaj potenco troviĝas en tiu-ĉi hierarkio, kiun la registaro tiel bone konas, por daŭre havi la povon. Tiel, se estas akceptata la hierarkio, estas akceptata ankaŭ la puno, kiu ĉiam estas aplikata al la ribelemuloj. Ni sufoku la ribelemon kaj la sukceso por la dekstruloj estas garantiata.
Por elimini la ribelon ne nur oni povas kalkuli pri eksteraj, subpremaj metodoj. Estas precipe necese praktiki la internan subpremon kiu realiĝas en la mensoj de la infanoj kaj junuloj, kaj la Eklezio "patrino kaj instruistino", scias tre bone kiel tion fari. Jam dum XXI jarcentoj ĝi tion faras.
La Ŝtato aĉetas la mensojn kiujn ĝi bezonas por realigi sian funkcion, kaj la Eklezio, la plej favorata en tiu aĉetado, lavas la cerbon al la hispanoj, eme al " la bono, la virto kaj la vero ", sed kompreneble, al siaj bono, virto kaj vero, ni ne forgesu.
De ĉiuj estas konate, ke ne eblas diskuto, ke tiu kiu havas en siaj manoj la instruadon ankaŭ havas la povon. Pro tio la Ŝtato forprenis tiun povon de la Eklezio, sed la Ŝtato bezonis la Eklezion kaj estis devigata streĉe alianciĝi kun ĝi kaj ambaŭ estas ne disigebla paro kiu bezonas unu la alian.
Disigitaj por iom da tempo, Eklezio kaj Ŝtato denove iras mano en mano por savi la landon de la ruĝa Hispanio, kiu deziras la progreson, kiu tiom da malbono kaŭzas al la nunaj vivaj fortoj de tiu-ĉi lando, kvankam estu modera progreso kaj sufiĉe surogata, sed tamen "progreso", rompo kun la senmova prapatra pasinteco.



Tiu-ĉi lando denove balotis favore al la dekstruloj. Eĉ se la modera maldekstra registaro ne bone regis la landon dum la tempo kiam ĝi havis la povon, tiu sukceso de la dekstro montras la nostalgion de la hispanaj civitanoj al reakcia lando, kiu estis tre " bone edukita " de la katolika eklezio. Tio supozigas ke la kondiĉoj por atingi involucion estas favoraj kaj oni povas denove montri la precizajn elementojn por determini la socion kiun " ili bezonas "
En tiu-ĉi hispana tero analfabetismo kaj religio ĉiam iris kune. Pro tio estas bezonata eduka leĝo kiu tenu en la ignorado, la fanatikeco kaj la superstiĉo difinitajn sociajn klasojn, dum ĝi preparas aliajn klasojn praktiki la povon sur la plej granda parto de la popolo. Pro tio estas necesaj la "itineroj" kaj kian ajn nomon ili donis, estas nur klasifikado de la lernantoj laŭ la socia klaso al kiu ili apartenas. Unuflanke estos la bonaj, lertaj, riĉaj, voje al la Universitato. La malpli bonaj kaj malpli riĉaj iros al la profesia kampo kiel kvalifikitaj manlaboristoj. La malpli inteligentaj, malriĉaj aŭ ribelemaj estos manlaboristoj. Malmulte aŭ tute ne kvalifikitaj voje al sia ekspluatado. La enmigrintoj iras al sekvanta itinero, kio estos gasta loko, kontrolo pri la subkaŝita laboro kaj ekzamenoj, ekzamenoj…
Tiu-ĉi eduka sistemo povas generi ribelulojn kaj pro tio estis necesa helpo de la plej bona instrumento kiun posedas la hispana dekstro: La Eklezio, la religio, la institucia cerba lavado.
Pro tio ne estas surprizo, aŭ malmulte surprizas, "indigi la religion kiel temaron", ĉar tio ebligas havi la katolikan Eklezion kiel aliancanon en tiu-ĉi lando kaj tiel la faŝismo estas ĉiam servata. Kiel ili trompas la popolon? Unue provokante kaj proklamante per diroj kaj faktoj la fiaskon de progresema leĝo kiel la LOGSE (Organa Leĝo de Ĝenerala Ordenado de la Eduka Sistemo. 3-10-1990), kiu faris la ne pardoneblan eraron ne ideologii en la lernejaj klasoj, klarigante la valorojn de la progresema maldekstro kaj poste atingante ke la gestudentoj senideigitaj kaj ne bone informitaj pri la historio de

tiu-ĉi lando finis kredante ke la demokratio estas "la plej bona" kiun oni povis havi, ne sciante ke burĝa demokratio estas precipe "burĝa" kaj trudas siajn celojn, kaj ke la formulo de la sistemo estis sendependa de siaj celoj. Aliflanke ĝi kreus junularon kiu nur agus per la konsumado, la facila sukceso kaj la konkureco, havante nenian homecan valoron por trovi pli bonan mondon. Tio-ĉi bone miksita konvinkis la hispanan socion por ke la pli multaj akceptu tiun-ĉi leĝon kaj tiun-ĉi dekreton.

Estas evidente ke ne ĉiuj gejunuloj akceptis tiujn-ĉi formulojn kaj ribelis, kiel fakte tiel okazas, sed en la fundo tiuj gejunuloj, plej granda parto, estas kaptitaj de la sistemo kaj ilia ribelado, iom post iom, malfortiĝos kiam ili fariĝos pli aĝaj kaj bezonos stabilan vivon. Ili serenigos siajn ideojn en siaj kapoj kaj havos laboron -estu kiel estu- kreos familion kaj komencos ŝuldi monon pro pruntodonoj kaj pagoj kiuj malebligos al ili daŭre batali. La ciklo fermiĝas kaj la programita ekvilibro daŭras. Por tiuj kiuj persistas, la malliberejoj estas pretaj kaj nuntempe jam troviĝas disidentoj.

La problemo de kredo en la ŝtatoj, la registaroj kaj la leĝoj estas ke la homoj ilin obeu malgraŭ sia kontraŭo, ĉar estas evidente ke la plej bona maniero por bari la leĝon estas ne ĝin plenumi, ĝin denunci al la gestudentoj por ke ili kritiku ĝin kaj klopodu blokadon, kiel jam estis farita pri la LOGSE, kaj en tiu-ĉi afero multon povas influi la profesoroj, precipe la ne konservativaj, ĉar la aliaj, ni jam scias, estas fidelaj al la trudantoj de la leĝo. La profesoroj, se ili ne volas klasifiki, ne klasifikas kaj se ne volas sankcii ekzamenantojn ili tion ne faras. Se ili ne volas ke iliaj gelernantoj akceptu kredon anstataŭ sciencon ili havas sufiĉe da eblecoj por tion sukcesi. La studentoj ankaŭ povas ribeli, oponi kaj denunci ĉiujn arbitrajn atencojn.

Fronte al la ordo ĉiam povas esti la malobeo kaj la sistema malobeo estas la plej bona defendo fronte al tiu-ĉi eduka sistemo pli kaj pli identa al tiu, kiu estis kaj suferigis la hispanan popolon dum la kvardek diktatoraj jaroj kaj ĝia katolika endoktrinado.

Revalorigi la religion kaj la religian fakton certigas ke ambaŭ estas necesaj en socio kie, la ŝtato kaj la eklezio, bezonas unu la alian por trudi valorojn kies signifo estas kiel se la homa specio ne estus valora en si mem kaj bezonus la kredon kaj dogmaron por doni signifon al la homa estaĵo. Tio-ĉi neniigas la kapablon esti kaj pensi per si mem kaj ni bezonas esti savataj de la malbonaj fortoj kiuj nin posedas. Ĝi supozas rezigni pri nia inteligenteco kaj boneco kaj daŭrigi nian vivon punataj kaj suferantaj pro niaj konstantaj pekoj, konsekvence al kredo en justeman kaj venĝan dion, al la registaro, al la patro, al ĉefo kiuj zorgas kaj protektas nin kaj nin premias aŭ punas laŭ nia respekto aŭ rifuzo al iliaj preceptoj kaj leĝoj.

Denove la infanoj, knaboj kaj knabinoj, de tiu-ĉi lando travivos infanecon plena je timoj, teruro, punoj kaj ĉiuj specoj de arbitraĵoj, pro tiu-ĉi malsaĝa leĝo kiu lasas la infanojn en ne defendebla situacio, nur kapabla fari el ili agresemajn, perfortemajn, malsekurajn, malsukcesintajn, trudemajn kaj briditajn, kun la nura ebleco ripeti tion kion ili suferis kaj daŭrigi la torturon al la venontaj infanoj por subteni landon prizoneman, kie la amo al la morto estas ĉiam super la amo al la vivo.

Hispanio dormas. Dume la fortoj de la malbono etendas siajn brakojn super niaj revoj, ĉar niaj revoj estas iliaj inkubsonĝoj.

Marteno

La jarkunveno de TANEF

okazis la 19-an de oktobro dum la Faulhaber-semajnfino en Nederlando. Raporton pri la kunsido vi trovos en sekvonta Sennaciulo.


Kelkaj partoprenantoj al la jarkunveno de TANEF

Sociala Movado kontraŭ la neoliberalismo de la Eŭropa Unio

Meze de novembro 2003 okazos en Pariza regiono la dua Eŭropa Socia forumo.

Dum la unua ESF en Firenco, novembro 2002 partoprenis 60.000 homoj.

La iniciato estiĝis dum la Monda Socia Forumo okazinta en Porto Alegro de la italaj kaj eŭropaj socialaj movadoj, kiuj antaŭe kunvenis dum G8 en Ĝenovo (Italio). Malgraŭ la penso de multaj homoj, la ESF ne estas simpla kopio de la Monda Socia Forumo. En Eŭropo oni klopodas konstrui socialan movadon je nivelo de Eŭropo. Ĉu la Eŭropa unio ne kreis la Eŭropan politikan spacon? Kaj ĉu la sociala movado ne postkuras kiam temas pri socialaj rajtoj kaj socialaj atingaĵoj? La neoliberalismo plene envolvita en la Eŭropajn interkonsentojn urĝas la taskon de la socialaj movadoj.

Unuan paŝon oni faris dum ESF en Firenco. Tie oni metis la bazon. Pluraj eŭropaj kampanjoj estis pridiskutitaj kaj socialaj retoj konstruiĝis aŭ rehejmis pli fortaj ol antaŭe. Rezultatoj de la ĝisnunaj kampanjoj ne ĉiam videblas, sed plej verŝajne la plej granda "gajno" estas ke almenaŭ ekzistas movado kiu kontraŭbatalas la Eŭropon de la neoliberalismo.

Montriĝas klare, ke ESF povas sukcesi nur dank' al forta strukturo. Do, rapide ni denove havu strukturon kiu eble kiel ĉe la sindikatoj lamigas la bazan ideon. Jam nun ne plu la bazo parolas sed la bazo devas peti parolrajton al grupo de 200-300 homoj kiuj estas la "organizantoj', kiuj ebligis ke post Firenco okazas nun ESF en Francio. Postaj kandidatoj estas nun Britio kaj Greklando.

Ĉiu kunsido de la Eŭropaj kunordigoj estas preparata de kvar laborgrupoj: 'organizado', 'programo', 'plivastigo' kaj sociala movado. Krom tio oni uzas la Eŭropajn kunordigojn ankaŭ por aliaj aferoj kiel kampanjo kontraŭ milito, ktp.



Kion vi devas scii ?

Multe da informoj vi povas trovi sur la paĝo de SAT ene de ESF < http://satesperanto.free.fr/esf/index.html>. ESF okazos inter la 12-a kaj la 15-a de novembro, do plej verŝajne jam finiĝos kiam vi ricevos ĉi tiun Sennaciulon? Tamen estas interese scii ke okazos la 12-an de novembro la unua Eŭropa asembleo por la rajtoj de virinoj. Multaj virinaj asocioj esperas ke ĉi tiun tagon naskiĝos granda trans-eŭropa kupola asocio. Saman tagon organizas la Eŭropa sindikata federacio sindikatan forumon. La oficiala malfermo de ESF okazos la 12-an de novembro vespere kaj la oficiala fermo estos la 15-an de novembro kun, kiel en Firenco, amasmanifestacio tra la stratoj de Parizo.

La konferencoj kaj seminarioj estos ĉiuj simultane tradukataj en la Francan, Anglan, Hispanan, Germanan kaj Italan. Do ankaŭ ĉi tie la "malgrandaj lingvoj" suferas diskriminacion kaj lingvaj rajtoj ne estas respektataj. Jes ni devas scii ke entute partoprenos homoj el sesdek landoj kiuj parolas kvardek diversajn lingvojn. Sed tamen estas notinde ke ankaŭ nova movado kiel ESF ne diskutas pri lingvaj problemoj kaj lingva egaleco.

Grava estas, ke oni faras apartan atenton al handikapitoj por ke ili povu sen problemoj partopreni iujn kunsidojn kaj debatojn. La vilaĝoj kie okazas la ESF estos en Parizo (la Villette), St Denis, Bobigny kaj Ivry. Antaŭvidiĝas 32.000 sidlokoj. En St Denis 11.000, Bobigny 8.000, Ivry 8.000, La Villette 7.000.

Evidente ESF signifas pli ol nur babili kaj diskuti. Kulturo havas apartan atenton nun kaj donas eblon al artistoj montri siajn verkojn.

La budĝeto de ESF estas 4.400.000 eŭroj. Ankaŭ ekzistas solidara fonduso kiu ebligas al malriĉaj asocioj, regioj kaj individuoj iun subtenon. La financado de ĉi tiu solidarkaso venas el la 10% de plialtigo de la kotizo kiun la partoprenantoj devas pagi. Ekzistas aparta kaso por la solidara mono.

Individuoj kiuj volas partopreni pagas 30 eŭrojn kaj

3 eŭrojn por la solidareca kaso. Financaj malfortuloj pagas nur(!) 3 eŭrojn.

Kio estas grava ?

La dua ESF estas grava en tiu senco ke ĉar la Eŭropo de la politikistoj faras grandan ofensivon kontraŭ socialaj rajtoj en preskaŭ ĉiuj membroŝtatoj, necesas ke ekzistu platformo kiu donas kontraŭpezon. ESF povas esti tio(?).

La nuna ESF okazas samtempe, kiam oni faras diskutojn pri Eŭropa konstitucio. Do ankaŭ en tiu senco la "voĉo de la popolo" povas havi certan efikon kiam oni faras decidojn (?), sed ankaŭ pri tio mi havas miajn dubojn.

Ĉu la ESF estas unueco kiu havas la nazojn en la sama direkto? Certe ne, kaj ni ankaŭ devas fari la demandon: ĉu tio necesas?

Kion ESF faras nun? Ĉu oni agadas por krei internacian solidarecon, tre granda ideo preskaŭ ne realigebla laŭ la plejmulto aŭ ĉu oni faras plian batalon ĉirkaŭ la temo "kontraŭ maldungoj kaj fermoj de fabrikoj"?

Fakto estas ke se la ESF en Parizo montriĝos esti levilo al granda mobilizado ĉirkaŭ centraj sociaj aferoj (Firenzo - la milito, kaj Parizo socialaj rajtoj), ni certe faras paŝon antaŭen al konstruado de Eŭropa sociala movado.

Iu ajn, en Parizo ni vidos pli emfazan ĉeeston de virinaj organizoj, pli fortan partoprenon de migrantoj, novan progreson en la organizado de la sociala movado en Centra - kaj Orienta Eŭropo.

Demando kiun mi nun faras 2 semajnojn antaŭ la evento estas: ĉu la junuloj nun aktive partoprenos, ne kiel spektantoj sed kiel kunagantoj? Certe vi jam scios tion kiam vi legos ĉi tiun tekston.

Jakvo

Informon mi prenis el " De Groene Amsterdammer kaj De Morgen"

Viaj opinioj

Opinioj de nova SAT-ano

Invitite sendi materialon al Sennaciulo, mi, freŝa membro de SAT, deziras jene prezenti miajn unuajn impresojn kaj ideojn pri nia organizaĵo. Mi emfazas ke la malsupraj ideoj estas tre freŝaj kaj nematuraj, ĉar, kvankam interesiĝanta ankaŭ pli frue pri la organizaĵo, mi povis nur lastatempe kontakti ĝin kaj ekkoni la ideojn ĝin gvidantajn.

Mi eliras el tio, ke al SAT min allogis ne la deziro esti nura membro de unu organizaĵo kun idearo (ŝajne) la plej proksima al la mia, sed tiu, pli fruktodone utiligi mian membrecon por la venko de la ideo de socialismo.

Mi estas madjaro (laŭ pli konata nomo "hungaro") vivinta dum 45 jaroj en lando socialisma, kaj la spertoj akiritaj en la lastaj jaroj estigis sufiĉe firman bazon por povi fari komparon inter la sistemoj socialisma kaj kapitalisma. La konkludo de ĉi tiu komparo konfirmas la konstaton de nia eminenta filozofo G. Lukács, laŭ kiu eĉ la malplej bona socialismo estas pli bona ol kapitalismo. Kaj ĉi tio estas ne malplena rezonado, sed ankaŭ mia konkludo el konkretaj faktoj. Jen kelkaj el ili.

Mi estis 55-jara, kiam mi perdis mian laboron pro la bankroto de la firmao, kie mi laboris kiel tradukisto (el la angla). La bankroto okazis pro (dufoja) forrabo de la tuta havaĵo de la firmao (demonstrilo pri la terure malalta nivelo de publika sekureco en kapitalismaj cirkonstancoj - ĉi tiaj raboj estis tre maloftaj en la socialisma Hungario). La maldungon sekvis kelkjara senlaboreco, ĝis lasta jaro kiam mi iĝis pensiulo. Kaj ĉi tio estas ankoraŭ ne ĉio.

Du el miaj filoj, kvankam ambaŭ sopirantaj labori, ne ricevas jam de pluraj jaroj laboron. Vidante ilian senesperiĝintajn rigardojn, mi rememoras kun nostalgio la Hungarion socialisman, kiam oni ne nur ne rifuzis la sinprezentantojn por laboro, sed diris: "venu, vi estus malmultaj, eĉ estunte duoble ĉi tiomopaj". La multnaciaj firmaoj venis al ni kvazaŭ elefantoj en vendejon de porcelanaĵoj, detruante nian nacian ekonomion kaj farante el miaj samlandanoj siajn sklavojn.

Mi mem aliĝis al unu el la hungariaj komunistaj partioj (MSZMP) por fari ĉion eblan por reporti socialismon.

Intertempe en mi maturiĝis ankaŭ la ideo ke bona komunisto devas esti ankaŭ laŭ internacia skalo klarvida, do mi provis ekkontakti eksterlandajn k-dojn (kun sukceso malgranda). Kaj jen, mi alvenis inter vin. Antaŭ ol prezenti miajn konceptojn rilate la aniĝon, mi deziras vortumi kelkajn miajn dubojn.

Traleginte la lastajn n-rojn de Sennaciulo, mi iom surpriziĝis vidante la heterogenecon de la nuna membraro kaj la diferencon inter la ĝeneralaj batalspiritoj sperteblaj en SAT de ekz. la jaroj 1930-aj kaj de niaj tempoj. La komparon ebligis la legado de la materialo pri la SAT-kongreso en 1931, respektive de la menciitaj n-roj de Sennaciulo.

Ĉu SAT estus ĝuste tiam perdinta sian batalfervoron, kiam la klasbatalo kontraŭ imperiismo bezonus neniam pli antaŭe bezonatan fortostreĉon por veki niajn samepokajn laboristojn ebriigitajn per rimedoj neniam antaŭe pli rafinitaj? La laboristoj de la okcidentaj evoluintaj kapitalismaj landoj silentis ankaŭ en la 1980-aj jaroj, lasante ke la medio de presmagnatoj kviete verŝadu la semojn de "malstreĉigo" en la socialismaj landoj, prezentante (ni tion jam klare vidas) allogajn, sed falsajn bildojn al la loĝantaro de tiuj landoj pri la "okcidenta mondo" - ĉu ili persistas silenti ankaŭ plu?

Vidante la rezignemon de kelkaj SAT-anoj (simile en la n-roj de Sennaciulo), mi havas malmulton da kaŭzoj por esti pli optimisma. Jen, unu japana SAT-ano rakontas la historion de sia senreviĝo pri socialismo, kio okazis simple ĉar en la Sovetunio tempe de Stalin oni povis akiri ankaŭ spertojn ne tre favorajn por la afero de socialismo. Jen la konfeso de la ĝenerala sekretario de SAT mem, K. Barkoviĉ, kiu nomis sin "viktimo de komunisma periodo en Pollando", kaj kiu sendube turnas sian dorson al la "komunisma" idearo (neĝenate de la simpla "bagatelaĵo", ke la entema komunismo ne ekzistis nur en la tiama Pollando, sed ankaŭ ie ajn en la mondo, eĉ nun ...). La gvidantoj de la socialisma Pollando tutcerte faris pekojn ankaŭ pli gravajn kontraŭ kaj sia popolo kaj la afero de socialismo ĝenerale (ankaŭ mi memoras, ke la vendejoj viditaj de mi en la j. 1986-a estis kiel malplenaj en kelkaj - se ne en ĉiuj - urboj de Pollando), ol kia estis la malpermeso al aranĝo de SAT-kongreso tie. Sed ĉu ĉio tio estas sufiĉe gravaj "argumentoj" por igi onin turni la dorson al la plej altranga socia sistemo, precipe en la vicoj de organizaĵo adoptanta (alm. laŭstatute) la plej noblajn ideojn de la homaro? "K-do" Barkoviĉ nomas unu periodon (evidente subkomprenante socialismon) kiel la kaŭzanton de sia "viktimiĝo", kvazaŭ periodoj mem povus igi iun ajn viktimo, kaj kvazaŭ lin "viktimigis" ne homoj, kies politika kariero estas verŝajne markita per agoj kontraŭaj al la ideoj de veraj komunistoj. La historiaj disvolvaĵoj dependas ankaŭ de la personaj kvalitoj de la aktualaj gvidantoj. Ni, hungaroj estis nomitaj bonŝancaj, havante tiel eminentan komuniston ĉekape de la socio, kia estis J. Kádár, kaj ni ankaŭ vivis trankvile, en relativaj bonstato kaj prospero. Tio, ke ĉi tia sorto Pollandon eventuale ne trafis, ne signifas ke sekve ankaŭ la idearo de socialismo-komunismo estas forĵetenda.

Mi devas demandi al mi: se ĉi tiajn ideojn nutras eĉ la ĝenerala sekretario de SAT mem, kaj la ceteraj SAT-anoj lin nomas kamarado (inter ili la prezidanto s-ano Schram, kiu povas havi idearon malsaman, konsidere lian personan sorton), ĉu tiam mi ne eraris, decidante (post iom longa hezitado) tamen aniĝi al SAT. Aŭ ĉu oni volas, konservante la tradician alparolmanieron en la organizaĵo, almenaŭ ŝajnigi la idean monolitecon, kiu fakte do ne ekzistas? Kiucele? SAT ja estas ne iu politika partio, klopodanta varbi pli da apogantoj por si.

Demandoj, demandoj, kiuj atendas respondon.

Johano Petik

Noto de redakta komitato :
J.P. eraras: tiuj vortoj ne estas de Kreŝimir Barkoviĉ, sed de Walter Zelazny (vd. p. 132, unua kolumno, 13a linio antaŭ la fino), kiu havas nenian funkcion en SAT. Ni ne scias, en kio konsistis la viktimiĝo de Walter Zelazny.

Kandela Marŝo en Kioto

En la urbo Kioto, Japanio, hodiaŭ (03-09-27) vespere okazis manifestacio por paco. Antaŭe oni nomis porpacan aŭ kontraŭmilitan marŝon «manifestacio por paco aŭ kontraŭ milito». Sed lastatempe junuloj ŝatas vorton «pacmarŝo». La hodiaŭa estis nomata «Kandela Marŝo», ĉar marŝantoj tenas kandelon en la mano por kondolenci viktimojn en diversaj militoj.

Apud Urba Virina Centro kunvenis je la 18a kaj duono ĉirkaŭ 130 homoj. Laŭvole oni apelaciis pri siaj ideoj pri paco aŭ kontraŭ milito. Je la 19a kaj duono la Kandela Marŝo ekiris eskortate de policanoj.

Marŝantoj portis kandelon en unu mano kaj afiŝon aŭ flagon en la alia mano. Afiŝoj kaj flagoj havis diversajn sloganojn en diversaj lingvoj: "Pacon en Afganio", "Irako, Palestino", "Usono ne intervenu en aliajn landojn"; "Japanio ne subtenu usonan registaron"; "Kontraŭ ĉiaj militoj"; "Japana Defendkorpuso ne iru al Irako"; "Kondolencon al ĉiuj viktimoj"; "Ne voĉdonu al la majoritata partio en la baldaŭa elektado de parlamentanoj"; "Defendu la Japanan Konstitucion kun la Naŭa Ĉapitro, kiu deklaras neniam militi" ktp laŭ propra bontrovo verkitaj. Sola komunaĵo de ĉiuj marŝantoj estas «Ne mortigu, ne estu mortigita, ne igu mortigi!»

Ne mankis maljunuloj, eĉ beboj, infanoj kaj hundo en la marŝo, kiu iris laŭ la plej homoplenaj stratoj en la urbo. Survoje plimultiĝis partoprenantoj, ne nur japanaj. Post unu kaj duon-horoj la Kandela Marŝo atingis la finan celon: Urbo-Domo.

En la urbo loĝas 1,400,000 homoj. Ni estis dekmil-ono. Ankaŭ esperantistoj pli-malpli samnombras. SAT-anoj tri.

(TAHIRA Masako, 33870)

SAT-Kulturpaĝo

redaktanto Cezar



KURO DE L'VIVO

Mi ne estis ŝtono ne nubo
neniu sonorilo kaj ne liuto
eksonigita de anĝelo aŭ de diablo.
Mi estis dekomence nenio alia krom homo
Kaj mi ankaŭ ne volas esti io alia.

Kiel homo mi elkreskis
kaj suferis maljustaĵojn
kaj kelkfoje faris maljustaĵon
kaj kelkfoje bonon.

Kiel homo mi indigniĝas
kontraŭ maljustaĵojn kaj ĝojas
pri ĉiu alludo de espero.
Kiel homo mi estas vigla kaj laca
kaj laboras kaj havas zorgojn
kaj malsaton je kompreno
kaj je tio esti komprenata.

Kiel homo mi havas ĝojon je miaj
amikoj
kaj havas ĝojon pri la edzino kaj
infanoj kaj genepoj
kaj timas pro ili kaj sopiras je
sekureco
kaj volas esti kun homoj kaj
kelkfoje sola
kaj bedaŭras ĉiun nokton sen amo.

Kiel homo mi estas malsana kaj
olda
kaj mortos
kaj ne estos ŝtono
neniu nubo kaj neniu sonorilo
sed tero au cindro
kaj tio ne gravas.

Erich Fried
trad. Donjo kaj Cezar


Karaj geamikoj,

Ekde nun ni komencas novan rubrikon en Sennaciulo - «La SAT-kulturo», en kiu ni montros, ke ni faras propran sennaciecan kulturon. Por tio ni havas la plej bonan bazon, kiu eblas, ĉar ni staras kiel progresema maldekstra asocio sur la flanko de ĉiuj, kiuj penas, ke nia planedo Tero iam fariĝu vere paca loko. Ni estu konsciaj, ke tiu pacokulturo neniam eblus, se ni ne jam nun kreus tian kulturon en ni mem kaj en niaj vicoj. Tial ni elektis kiel simbolon por ĉi tiu kulturo la packolombon, kies simbolon kreis fama pentristo Picasso.
En ĉiu Sennaciulo vi trovos ekde nun artikolojn pri niaj kulturaj agadoj, belan poemon, bongustan kuirrecepton, diversajn bildojn, karikaturojn kaj aliajn tekstojn, kiuj pruvas, ke ni tute ne estas tiel dogmemaj kaj unuflankaj, kiel oni parte supozas tion ankoraŭ nun pri ni. Ni montru tion! Ni gajnu la korojn de la simpatiantoj, kiujn ni sendube havas, - ankaŭ per homafabla maldekstra SAT-kulturo, ĉar nia asocio nepre bezonas novajn kaj junajn membrojn.

Via kulturredaktoro - Cezar

Vizitu nian TTT-paĝon:http://www.marktplatz-deutschland.de/rsabg/pic2/sat-kulturo/

SAT-kulturo ne falas el la ĉielo – ni faras ĝin !



B. Traven:
MORTULA ŜIPO
Romano, tradukita de Cezar, mendeblas nun ĉe SAT kiel kompaktdisko en PDF formato. Prezo 10 €.

Kial ni bezonas SAT-kulturon ?

La SAT-kulturo celas helpi ĉe la elformo de la estetike kleriĝintaj homoj, kiuj « maldekstre » pensas kaj sentas. Helpe de la planlingvo Esperanto, SAT prezentas diversajn kulkturajn branĉojn kaj uzas sian propran kulturan agadon ĉe kongresoj kaj aliaj okazoj. La okupiĝo pri kulturo helpas pli bone kompreni, kompari kaj prijuĝi artajn verkojn, diversajn skolojn kaj politikajn tendencojn en tiu vasta kampo, tiel ke la esperantistoj mem pli bone povas agi en la sfero de la kulturo, kiu enviciĝas en la strebojn de ĉiuj progresemaj pacamaj homoj. Grava tasko de la SAT-kulturo estas interesi simpatiantojn je nia kultura laboro, por tiel gajni kunlaborantojn, kiuj poste eble eĉ fariĝos membroj de SAT.

La foto de la belulino

Tiun foton mi faris dum la SAT-kongreso en Ĉaŭdefono: en la kuirkurseto de Viola.


Japana kuirarto dum SAT-Kongreso



Konsilo por pacemaj soldatoj

Se vi pro iu stulta kaŭzo tamen fariĝis soldato, kaj oni intencas sendi vin en militon aŭ en iun similan entreprenon, por ke vi murdu homojn kaj mem mortu kiel heroo, faru jenon: vundu iom per tranĉilo la haŭton de unu el viaj tibioj. Do, forgratu iom da haŭto kaj metu sur tiun loketon duonigitan cepon kun la tranĉita flanko sur la vundon. Poste firme bandaĝu ĝin kaj lasu ĝin kiom eble plej longe netuŝita. Tio iom jukas kaj doloras. Elformiĝas danĝere aspektanta ŝvelaĵo, kiu bezonas tujan kuracadon en lazareto aŭ en milithospitalo.

Averto! Tio iom doloras kaj daŭras ĝis la vundo estas kuracita. Kelkaj suboficiroj kaj oficiroj konas la trukon, eĉ kelkaj medicinistoj. Do ne diru tion al iu, se vi tion faras, por ne troviĝi antaŭ milittribunalo. Sed estu kuraĝa! La truko jam savis multajn vivojn. Eble ĝi savos ankaŭ la vian. Restu viva kamarado!

Cezar



Bertold Brecht

Balado pri Mackie Messer

Kaj la ŝarko havas dentojn,
montras ilin sen ĝentil',
Kaj Macheath tranĉilon
havas
nevideblas la tranĉil'.

Aĥ, ruĝiĝas la naĝiloj
de la ŝark', se fluis sang'.
Mackie Messer portas
gantojn,
sen makul', laŭ sia rang'.

En dimanĉo bele blua
kuŝas strande morta hom'.
Vir' foriras post angulon,
Messer estas lia nom'.

Kaj Ŝmul Majer malaperis
kiel ofte riĉa vir'.
Kaj la monon havas Mackie.
Ne pruveblas la konspir'.

Jenny Towlern oni trovis
kun tranĉilo en la mam'.
Iras kaje Mackie Messer,
sen eĉ scii pri la dam'.

Kaj la granda brul' en Soho:
Sep infanoj kaj oldul'-
sen molest', naiva Mackie
en amasas post la brul'.

La vidvino neolenaga,
fama estas ŝia nom',
ŝi vekiĝis perfortita.
Mackie, kiom kostas hom'?

Kaj la fiŝoj malaperas.
Ĉagrenite la kortum'
devas voki eĉ la ŝarkon,
sed li neas sen cerbum'.

Li ne povas rememori,
kaj ne eblas kapti lin.
Ŝarko estas ja ne ŝarko,
se ne trovas pruvoj sin.

Tradukis Cezar

Ni parolos pri neneŭtrala esperantismo de Sennacieca Asocio Tutmonda

En libro de Giordano Moya, «Esperantismo, Prelegoj kaj Eseoj», eldonita en junio 2002 aperis sekva teksto pri SAT kaj la nuna situacio de la laborista klaso en la mondo:

Sennacieca Asocio Tutmonda -SAT - fondiĝis en la Kongreso en Prago aŭgusto 1921. Ĝi estas laborista klasbatala asocio, kiu pere de Esperanto celas: "per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj, bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias la plej rekta aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo".

SAT post sia fondiĝo rapide kreskis, sed baldaŭ devis sperti gravan krizon pro la entrudiĝo de la dogmecaj stalinaj komunistoj.

Ĝi superis la krizon, sed ĝia akcela kreskado ne daŭris. Nuntempe SAT restas vivanta, sed stagna kaj sen espero, ke ĝi fariĝu decida faktoro por la solvo de la sociala problemo. Fakte SAT kaj same UEA, kiel esperantistaj movadoj, restas stagnaj.

Vere, en la nuntempo, ĉe la sojlo de la dudekunua jarcento, SAT devus esti la plej forta sociala organizaĵo. La planediĝo kunportas, ke la socialaj problemoj estu planedskalaj. La naciaj sindikatoj taŭgas por nenio. Al la transnaciaj entreprenoj devus respondi transnaciaj sindikatoj. En la Eŭropa Unuiĝo mem la sindikatoj restas naciaj dum kapitalismo fariĝas transnacia. Kio okazis? La sociala asekuro mildigis la sorton de la laboristaro, sed ankaŭ fariĝas, ke la laboristoj dependu de la ŝtato. Se la ŝtato ruiniĝus la laboristoj restus sen asekuro. Oni ankaŭ povas diri, ke la plej multo el la laboristoj delasis esti proletoj. La nunaj proletoj estas la gastlaboristoj alvenintaj de ekster Eŭropo, sen iu rajto kaj farantaj laborojn, kiujn la nacianoj ne ŝatas fari. Tiuj gastlaboristoj, pro neinstruiteco, kutimiĝintaj vivadi en mizero, ne povas esti klasbatalantoj, ĉar ili riskas esti forsenditaj al siaj landoj.

La ordinaraj salajruloj kaj nuntempe eĉ multaj direktoroj de entreprenoj, estas salajruloj. Ili povas posedi aŭtomobilon kaj fakte ne estas proletoj. La plej multo distras sin per banalaĵoj, kaj se ŝatas cerbumi pri socialaj problemoj, okaze nur pri siaj laborkondiĉoj kaj salajro, sed laŭ la vidpunkto de propra profito. Certe ekzistas la sociala problemo de sendungiteco kaj multaj mizeruloj meze de la abundeco, sed ili estas minoritato.

La nuntempa planediĝo estas kapitalisma. La Eŭropa Unio naskiĝis por alfronti la rusan komunismon kaj ĝin impulsis politikistoj kaj kelkaj intelektuloj. La laborista klaso ne estas nuntempe tiu kiu impulsas la socion. La fiasko de la rusa komunismo faras, ke la amasoj estu skeptikaj pri la solvo de socialaj problemoj per perfortaj revolucioj.

Tamen, la planediĝo prezentos gravajn socialajn kaj sociajn problemojn mondskale. La ekonomio de merkato ne certigas la ĉiean bonfarton, tute kontraŭe, povas riĉigi iujn landojn kaj mizerigi aliajn, kaj eĉ krei mizerulojn meze de la abundeco de la riĉaj landoj.

Estas do, nenio pli aktuala ol la celo de SAT en tiu eduka agado.

Ĝia rolo povas esti la plej granda faktoro de sociala renovigo kaj fariĝi grava faktoro de socia renoviĝo.

Ĉu la laboristoj devas interkompreniĝi per la angla lingvo?

Esperanto fariĝas nepre necesa kaj en tio SAT devas roli. Sed la hodiaŭa SAT ankaŭ dormas revante pri ideoj de la pasinta deknaŭa jarcento, ne taŭgaj por alfronti la socian problemaron de la kapitalista planediĝo. Tiu celo: "la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, ktp", devas enkonduki al la formulado de novaj tezoj por solvi la socialajn problemojn, kaj atingi la homarunuiĝon.

Giordano Moya

Koran dankon al Giordano Moya ke li donis permeson aperigi supran tekston

Esperantista partopreno en Konferenco de civilaj organizoj

27-28.10.2003 en Moskvo (Konferenca centro de la hotelo «Kosmos») okazis Tutrusia Konferenco de Civilaj Organizoj, kunvokita laŭ iniciato de la Movado «Por homaj rajtoj», «Konfederacio de Laboro de Rusio», «Centro de Ekologia Politiko de Rusio» kaj kelkaj aliaj neregistaraj organizoj. Ĝin partoprenis ĉ. 1000 delegitoj de diversaj neregistaraj nepolitikaj organizoj (homrajtdefendaj, ekologiismaj, virinaj, liberaj sindikatoj, ktp.) el ĉiuj regionoj de la lando. Krom plenkunsidoj, funkciis 17 sekcioj kaj rondaj tabloj pri diversaj akraj problemoj de la rusia socio. La neceso de la Konferenco gravas pro tio, ke ĝi estis kvazaŭ alternativo al simila aranĝo, okazinta kelkajn tagojn pli frue laŭ iniciato de la Prezidento, devinta montri kvazaŭan subtenon de la civila socio al la prezidenta kaj registara politiko. La desube kolektiĝinta Konferenco klare montris, ke la nepolitikaj sociaj aktivuloj plene kontraŭas al la kreskantaj pro tiu politiko negativaĵoj.

La unuan fojon en la historio Rusia Esperantista Unio oficiale partoprenis en tiaspeca granda aranĝo kiel egalrajta civila organizo (apartaj esperantistoj, certe, renkonteblis ankaŭ en aliaj aranĝoj, sed ne kiel reprezentantoj de sia propra asocio). Plej aktive ili partoprenis en laboro kaj diskutoj de la sekcio «Civila socio kaj problemoj de migrado, repatriado kaj ksenofobio» kaj ronda tablo «Civila socio kaj defioj de tutmondiĝo». Al la menciita sekcio estis eĉ proponita kaj disdonita rezolucipropono pri signifo de Esperanto en batalo kontraŭ ksenofobio, tamen pro manko de tempo oni ne sukcesis ĝin pridiskuti (bedaŭrinde, kiel ankaŭ kelkaj aliaj gravaj problemoj koncernaj). Estis disdonitaj ĉ. 350 kompletoj de diversaj materialoj pri Esperanto; en vestiblo dum paŭzoj konstante deĵoris iu el la esperantistoj, kiu respondis demandojn pri nia lingvo kaj movado. Estas interese, ke inter partoprenintaj esperantistoj plej aktivis membroj de SAT, Oleg Izjumenko kaj Nikolao Gudskov.

Inter rezolucioj, akceptitaj en la Konferenco, por ni menciindas la rezolucio de la ekologia sekcio, postulanta liberigi la membrojn de la societo PORTOS (estantaj, i.a., esperantistoj kaj SAT-anoj), arestitaj pro false fabrikitaj akuzoj.

Nikolao Gudskov

PRI "PORTOS"

En Gotenburgo ĉeestis Tamara Kostjug - unu el la organizantoj de Portos / Teorio de Feliĉo. Ŝi estas libera ĉar ŝi ne estas rusino. Ŝi montris al mi TV-filmon pri la agado de sia grupo en Rusio. Kelkaj de iliaj organizantoj ankoraŭ troviĝas en malliberejo.

Nun mi komprenas iomete:

Portos estas organizita simile al kibuco: nepagataj organizantoj sed ankaŭ pagataj laboristoj (ĉu en kibuco laboras pagataj laboristoj ?), inter ili junuloj, kiuj antaŭe vivis sur la strato. Ili estas/-is organizitaj simple, sed efike: pago laŭ laborkvanto, ĉiuj (?) vivis kune sur la ferma areo. Mi ne scias ĉu ili pagis imposton (mi supozas ke ne). Mi havas la impreson ke ili eble kondutis kiel propra ŝtateto. Ili etendigis la aktivecon ankaŭ al aliaj urboj. Ili sendis la junulojn kaj infanojn por labori al bieno, kiu laŭŝajne estis privata posedo de unu el la organizantoj.

Ili havis armilojn - sed ĉu laŭleĝe por defendi siajn posedaĵojn ?

Ĉiukaze Tamara havas altajn celojn - ĉu ili konformas la demokratian manieron de la dispartigo de la potencoj ?

Ŝi emas esti fotita kun ŝtatestroj kiel Putin, Gorbaĉov k.a.. Por mi ne eblas prijuĝi ilin entute.

Ĉiukaze ili donis al surstrataj junuloj (k.a.) laboron, loĝlokon, manĝaĵon. Sed tamen restas demando, ĉu laŭleĝe, ĉu ne. Temas pri socio- kaj ekonomio-politika afero.

(de M.W.)



el *Fonto* n-ro 268, aprilo 2003

OSIEK-PREMIO 2003

En 2003 la OSIEK-anoj proponis 25 verkaĵojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 24an de julio, dum la IEK en Prago, Ĉeĥa Respubliko, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Gerrit BERVELING

pro:


Antologio Latina

Gratulon!

La premio, 500 eŭr., rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuë, Francio kaj http://osiek.org

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,64 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7,29 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 9,49 € (reg. afranko).

FONDUSO BILLY WALDON
Kobayasi 5000 JPY ; Nonomura 5000 JPY ;

SOLIDARSERVO
Nonomura 5000 JPY

POR LA NOVA KOMPUTILO:
M. Rémy 20,00 Eŭroj. P. Quillaud 80,00 Eŭroj, Unoki 10000 JPY ; Hanazawa 10000 JPY ; Makino 10000 JPY ; Nonomura 10000 JPY ; Tahira 10000 JPY ;

NOVALIĜOJ

35.633 Ignatov Christo, p.k.15, BG-9620 Albena, Bulgario.
35.634 Markov Metodi, str. Vasil Levski 20, BG-2700 Blagoevgrad, Bulgario
35.635 Meĉev Gospodin, str. Car Kalojan 29, BG-6000 Stara Zagora, Bulgario
35.636 *Tonkova Margarita, Jk. Druĵba bl. 412, vh.'v' et.1 ap.2, BG-5800 Pleven, Bulgario
35.637 *Miteva Cvetanka, kv. Storgozija bl. 40 et.1 ap. 1, BG-5800 Pleven, Bulgario
35.638 *Bogoslpvova Soĝa, bul. Saborni 31, et.1 ap.1, BG-9000 Varna, Bulgario
35.639 *Ivanova Ivanka, str. Petrohan 94, bl.Komarov, p.k. 59, BG-7005 Ruse, Bulgario.
35.640 *Donkova Velika, str. Dimitar Donĉev 4, vh.2 p.K. 15, BG-7005 Ruse, Bulgario
35.641 Donkov Stojan, str. Dimitar Donĉev 4, vh.2 p.K. 15, BG-7005 Ruse, Bulgario
35.642 *Gardner Vesselina, str. Odrin 21/1-2, BG-9000 Varna, Bulgario
35.643 Orsingher Cyril, 44 av. de St. Ouen, FR-75018 Paris, Francio.

NEKROLOGO
La 8-an de aŭgusto forpasis en Saint-Appolinard (FR), 71-jara, nia malnova membro, kamarado

Jean DETTWILLER
(matr. 28.226)

Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.

****

La 6-an de aŭgusto, en Inuyama (JP) mortis 83-jara, pro korinfarkto, nia dumviva membro, kamarado

MUKAI Kou
(matrikulo 31.246)

K-do Mukai Kou estis la plej grava posteulo de k-do Jamaga Taiĵi (1892-1970, matr. 1144). Estante batalanta anarkiisto-esperantisto, li estis kerno de diversaj civitanaj movadoj: pacista, kontraŭatomcentrala ktp, en Japanio.
Ni kondolencas al familianoj kaj liaj gekamaradoj.

****

La 25.09.2003 forpasis en Beziers (FR) , 92-jara, nia malnova kaj fidela membro, k-dino

Denise CASTELLO
(matr. 21.649)

Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.

******

En Kerity (Paimpol) (FR), ĵus forpasis nia malnova membro, k-dino

Madeleine GUILLOU
(matr. 23.646)

Ni kondolencas al amikoj kaj familianoj.

*****

Kun profunda funebro mi devas komuniki al vi la morton de mia edzino

Inge RODEWIG
(matr. 33.345)

la 27.09.2003 en aĝo de 75 jaroj. Post grava operacio jam antaŭ preskaŭ 3 jaroj, ŝi nun devis suferi du aliajn operaciojn denove, kies sekvojn ŝi ne trastartis.
Ni konatiĝis kiel junaj homoj kadre de la Esperanto-movado, al kiu ŝi ĉiam restis fidela, kvankam ŝia unua zorgo estis la familio. Krome ŝi multe aktivis en socialaj aferoj okupiĝante dum la pasintaj 30 jaroj ĉefe pri gemaljunuloj.
Mi dankas al ŝi pro pli ol 50 jaroj da kunvivado.

Hans Rodewig

Ni esprimas sincerajn kondolencojn al nia k-do Hans.

*****

En Oldenzaal (NL) forpasis 87-jara la 20.09.2003, nia kamarado

T.J. BENAVENTE
(matrikulo 32.980)

Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.



77-A SAT-KONGRESO BRATISLAVA (SK) 2004--08-14/21

Organiza garantianto : KAVA-PECH, kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle, kunorganizanto: ESO, Esperanto-Societo Bratislava.

Koresponda adreso: KAVA PECH, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice. Tel: +420 257 712 201; fakso: +420 257 712 126; rete: info@kava-pech.cz; http://www.kava-pech.cz.

OKK: Petro Chrdle, Zdenek Pluhar, Jana Melicharkova, Jarmila Rechtorysova.


La 77-a SAT-kongreso okazos unuan fojon en Slovakio, precize en ĝia ĉefurbo Bratislava, kiu logas kaj pro sia beleco urba, kaj pro la konekto kun bela naturo: rivero Dunaj (Danubo), montetaro Malé Karpaty (Malgrandaj Karpatoj).

Kongreskotizoj (en Eŭroj)	ĝis 31.01.04	ĝis 30.04.04	ĝis 30.06.04	pli poste
SAT-membro	55	65	75	85
SAT-geedzoj (se ambaŭ)	80	95	110	125
SAT-junul(in)o ĝis 25 j.	25	30	35	40
Nemembro de SAT	70	80	90	100
Junula nemembro de SAT	35	40	45	50

Infanoj ĝis 10-jaraj ne pagas kotizon.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SI, SK ĝuas 30% rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI, eksa SU kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.

ATENTU : Personoj el landoj, kiuj bezonas enirvizon por Slovakio devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2004. Pli poste ne plu eblos trakti tion.

Kongresejo: Kiel kongresejo servos Kultura domo TRNAVKA en samnoma urboparto de Bratislava kaj parte ankaŭ la apuda hotelo PLUS.





Du fotoj de nia kongresurbo - Bratislava

La 7a Ĉielarka Marŝo en Sapporo

Mi partoprenis al la 7a Ĉielarka Marŝo (Rainbow March: la parado de seksminoritatoj) en la 14a tago de Septembro en la jaro 2003. Ĉirkaŭ 900 seksminoritatoj (gejoj, lesboj, anbaŭseksamantoj, transseksuloj, transgenruloj, interseksuloj, senseksdeziruloj,....) partoprenis en la parado. Ni marŝis en centro de Sapporo (Susukino kaj Oodoori) reklamante al loĝantoj de la urbo, ke ĉie ĉiam ni seks-minoritatoj ekzistas. Mi preparis kaj kunportis



reklamkarton :»Senseksdeziro, Senproblemo!» kaj «Viro kondutu Virece? Virino kondutu Virinece? Eskapu el tia Ideo!».

Post la parado, okazis Fiereca-kunveno kaj, en tiu kunveno urbestro de Sapporo (S-ro Ueda Fumio) paroladis. Tio estas la unua fojo, ke urbestro paroladis en seksminoritata okazaĵo en Japanio. La parolado de urbestro de Sapporo estas jena, kaj ricevis grandan aplaŭdon en la kunvenejo.

Resumo de la Parolado de urbestro de Sapporo

"Mi tre ĝojas, ke multaj seksminoritatoj venis al ĉi tiu marŝo en Sapporo. Mi dankas al vi, ĉiuj partoprenantoj, kiel reprezentanto de la loĝantoj de Sapporo.
Mi tre ĝojas, ke vi prezentis vin kuraĝe, kaj ke troviĝas en ĉi tiu Sapporo urbanoj, kiuj kuraĝigas seksminoritatojn.

Homaj Rajtoj, tio estas rajtoj, ke homoj vivu kiel homo, persono vivu kiel persono, mi pensas. Estas minoritatoj, kiuj plej bezonas homajn rajtojn. Homaj rajtoj de majoritatoj ĉiam estas garantiataj. Homaj rajtoj de minoritatoj ne ĉiam estas garantiataj...eĉ malgarantiataj.
Tio estas realo de minoritatoj.

En nia historio, ni konstruis la kadron de «Homaj Rajtoj», kaj ni nepre devas gardi la rajtojn de persono.
Ni havas Konstitucion de Japanio kaj Tutmondan Deklaron de Homaj Rajtoj.
Ili estas kreitaj de homoj post multaj eraroj. Konfirmante tion kun vi, ni ĝojas, ke vi ekagadis en tiu ĉi urbo Sapporo.



Familianoj de seksminoritatoj. Tute ne estas hontinde, ke viaj gefiloj estas minoritatoj. Estas via fiero, ke via gefiloj prezentas sin gaje.
Kaj gefilojn gardas ni, la gepatroj kaj familianoj. Mi volas fari la urbon Sapporo tia, ke ni iniciatos movadon de spirita liberiĝo kune kun via gefiloj kaj antaŭenpuŝos la homan saĝecon.

Skribita en la 17a de Oktobro 2003.

NISHIKAWA Satoru <snisikaw@asexual.jp>

NI LEGIS POR VI.....

La Zamenhof-Strato, Roman Dobrzynski, eld. Varpas, Kaunas, 2003

"Verkita laŭ interparoloj kun D-ro L.C. Zaleski-Zamenhof" estas ties subtitolo. Fakte oni povus kunigi ambaŭ homojn kiel kunaŭtorojn, tiel nedisigeble ili kunlaboris en tiu verko.

Ĝi ŝajne estas intervjuado de la dua far la unua - ŝajne, ĉar kiel Roman mem klarigas, la verkado daŭris jarojn, la korespondado postulis foje monatojn… Proksimume en la unua duono de la libro, Inĝeniero-D-ro Z-Z. parolas pri sia vivo; en la dua, pri la Avo, kun A majuskla, kaj pri Esperantismo ĝenerale.

Louis-Christophe Z-Z. estas sufiĉe fama ĉe Esperantistoj. Oni ne bezonas rememorigi, ke li travivis kruelegan periodon 1940 - 1942 en la Varsovia geto, el kiu li kun la patrino mirakle sukcesis eskapi la 8an / 9 / 1942, laŭ maniero, kiun cetere li ne tre precize rakontas: " Oni povis facile enmiksiĝi en la grupon (de laboruloj eksteren) subaĉetante judan policiston, poste la polan" (p. 47). Facile? Modesteco de l' heroismo… Li aldonas (p. 98), ke la savo de Wanda la patrino far kuracisto metante sur ŝin blankan kitelon "ŝi estas mia asistantino" (Letero

daŭrigo pa. 160

daŭrigo de la paĝo 159

de M. Noll en Ludovikito, Kromkajero 2 bis, p. 169) estas legendo. Tamen "ne ekzistas fumo sen fajro" (Proverbaro); L-C. mem elvokas junan kuraciston: "Subite li puŝis min sur preterveturantan ĉaron kun kadavroj". La juna kuracisto jam tiel savis lian vivon (p. 45). Oni bedaŭras ne scii iom pli pri tiu juna kuracisto, Jan Frendler, kiu tiel riskis sian vivon per sia miriga sindonemo al la Z-familio, al la adoleskanto Ludoviko-Kristoforo kaj eble ankaŭ al la patrino Wanda; tia faro meritas eternan admiron kaj dankemon!

La cetero de la vivo de Ludoviko-Kristoforo eble estas malpli interesa al samideanoj; ĝi estas tiu de brila inĝeniero fuĝinta el komunista lando, kiu talente sukcesas altnivelan karieron de beton-konstruisto tra la tuta mondo.

Sed la dua parto de la libro ekde p. 109, malpli personeca, estas pli alloga el esperantologia vidpunkto.Ĝi prezentas la tutan historion de la lingvo kaj de la movado tra la prismo de unu el la raraj pluvivantoj de la antaŭmilita periodo, kaj de la verŝajne plej bona konanto "de interne", pro familiaj motivoj, pri la tuta esperantisma afero. La demandoj de Roman estas rektaj, trafaj, precizaj; la respondoj honestaj, pripensigaj, senmeandraj. Eble la preparo de la respondoj sentiĝas; neniam Ludoviko-Kristoforo balbutas aŭ elseliĝas. Tio eble demetas iom da spontano el la dialogo, sed kompense certigas seriozan antaŭstudon de la priparolataj temoj. Ĝia legado estas aparte rekomendinda al la novbakitaj esperantistoj, kiuj, ofte kapablaj kontentige esprimiĝi en la internacia lingvo, bedaŭrinde scias absolute nenion pri niaj prauloj. Afliktiga en si mem, tiu nekono fariĝas grava balasto por la progreso de la movado, ĉar la nunaj homoj ne povas profiti la sperton de siaj antaŭuloj kaj riskas preni la samajn misvojojn kaj rekomenci la samajn agerarojn. Aliparte, aspektante bagatelece malserioza, tia nescio riskas deturni de esperanto klerajn interesatojn.

Du atutoj nepre menciindaj faciligas tiun legadon: la belo de l' eldono: jen libro eleganta, en kartona fortika kovrilo, arte prezentita, sur papero preskaŭ luksa. Brave al la Litovoj, al kiuj ni ŝuldas tian belegan libron. La dua atuto estas ties bonega Esperanta lingvo. Ĝi fluas simple, tamen elaste, elegante, kvankam en moderna vesto, senhezita antaŭ kelkaj necesaj neologismoj sur tereno teknika aŭ politika. Ĝi ja estas modelo de Esperanta lingvo. Unu solan eraron mi notis, verdire kutiman ĉe samideanoj, p. 186 "putriĝinta reĝimo"; ne: putrinta!. Dankon, Roman; la eleganteco de stilo en la nunaj verkoj estas tiel ofte flankelasita, ke oni vere ĝuas vian klaran kaj efikan skribmanieron.

Kiam oni kalkulas, kiom da libroj valoras la penon, ke oni lernis Esperanton por ilin frandi, la fingroj de niaj manoj ĝenerale sufiĉas. Nu, La Zamenhof-Strato nediskuteble apartenas al tiu inda minoritato.

Johan' -Luko 21/08/2003

S.A.T.  ERINACO

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

KIOM VI KONAS VETURILOJN ?

1							
2							
3							
4							
5							
6							
7							
8							
9							
10							
11							
12							
13							

Por faciligi la solvon por ĉiuj vortoj estas donita la komenca litero. (R) = radiko.

Hor:
1. G- Senmotora aviadilo
2. B- Velboato
3. R- Barko aŭ barĝo trenata de motorŝipo
4. B- Aeroplano kun du paroj da aloj
5. S- Motorskutilo
6. K- Iama hispana velsipo
7. K- Speco de ŝipo, pli malgranda ol fregato
8. B- Velocipedo kun egalaj radoj
9. K- Korboboato
10.. G- Barketo uzata en, Venecio
11. K- Ŝarĝaŭto
12. G- Velŝipo, skuno
13. A- Aŭtomobila omnibuso (R)

Vert. (sign.lokoj) S-aerportata milita veturilo destinita por esploroj.

I. Moĉilnik